

**Skajpkunveno: mardo, 30a de oktobro, 10.00 (RC, AT), 11.00 (VMA, RP).**

Renato Corsetti, Angela Tellier, Vicente Manzano-Arrondo (Radojica Petroviĉ ne ĉeestis pro neidentigita skajproblemo nia, sed li prezentis siajn ideojn retroŝte en prepara interŝanĝo antaŭ la skajpkunveno).

Mallonga diskuto pri planoj de ILEI kaj nuna agado de la Komisiono pri universitata agado. RC raportis, ke la komisiono ankoraŭ ne ekagis.

Diskuto pri la neceso ellabori konkretajn planojn, kaj sekve starigi kunlaborajn grupojn.

Multaj homoj instruas en universitato, sed ne informas pri tio, sekve estas malfacile subteni tiujn homojn, aŭ ligi ilin por komuna laboro/subteno. Retejo ne aspektu tro eŭropeca por kuraĝigi homojn ĝin uzi.

Diskuto pri la kutima 'cirkla' problemo - necesas kuraĝigi/konvinki studentojn lerni, nepras ke ili vidu kialon (ekzemple, haveblecon de stipendio), se ili ja vidas kialon necesas provizi al ili instruadon, pro tio necesas ke profesoroj/lektoroj parolu Esperanton ...

**Agadpunkto:** kompili liston de universitata agado, instruado, kursoj, esploroj ktp.

**Agadpunkto:** VMA proponis starigi esploron en kelkaj landoj (tia esploro ne formas parton de la ĉi-jara Nitobe-raporto). Temas pri esploro pri la motivoj pro kiuj studentoj eklernas, pri la agnosko de kreditoj fare de la universitato kaj pri la motivoj pro kiuj studentoj forlasas la kurson.

**Agadpunkto:** informu studentojn pri la havebleco de stipendioj far ESF; necesas traduki la 'regulojn/kriteriojn' en plurajn lingvojn; dissendi rete, kaj ilin afiŝi en la retejo de ESF.

**Agadpunkto:** ESF kaj ILEI pripensu kampanjon por informi pri la eblecoj ricevi stipendion. AT sendu specimenan tekston al la grupo; kaj ekzempleron de la afiŝeto jam dissendata (en la angla).

**Agadpunkto:** Pripensi seminarion (kolekto de interesaj prelegoj), kiu taŭgu por montri al universitataj kolegoj la taŭgecon de Esperanto kiel universitata komunikilo, sen rekte reklami pri Esperanto

**Agadpunkto:** necesas kunligi homojn, pluraj sentas sin izolitaj kaj bezonas/deziras helpon. Ellabrou retan sistemon por aktivuloj - necesas pripensado/diskuto.

**Agadpunkto:** VMA sendis tekston pri projekto: faciligi la kuniĝon de aktivulaj grupoj en universitatoj, kiuj konsentu fari siajn universitatajn laborojn [pri ĥemio aŭ pri la adjektivoj en la antikvaj babilonaj lingvoj - la temo ne gravas], sed konsentas ankaŭ pri la bezono plibonigi la eksteran kaj enan rolon/funkcion de la universitatoj kaj pretas esti en reto de tiuj universitataj grupoj, kie oni interŝanĝas informojn per Esperanto.

Venonta kunsajpado: **merkredo, 14a de novembro, 10.30 (AT, RC), 11.30 (VMA, RP).** AT dissendos la protokolon al la ILEI-a komisiono, post aprobo, kaj petos anojn kunsajpi.